

# POLAJ STACIDOMOJ

## 1 La stacidomo de Gdansk

En ĉiuj landoj de la mondo ekzistas stacidomoj, ĉu novaj, ĉu malnovaj, pri kiuj estus inde verki artikolon! Sed mankas tempo kaj papero! La antaŭa artikolo priskribis la tegmentojn de la stacidomo de Kolmar; nun ni observu la silueton de la stacidomo de la pola urbo **Gdansk**.

Senhezite, oni povas konstati kiom multe similas ambaŭ stacidomoj, de Colmar kaj Gdansk. Tia simileco facile klarigeblas: ambaŭ urboj estis parto de la germana Imperio, fine de la 19a jarcento. La unuan stacidomon starigis la *Preussische Ostbahn* [prusa orienta fervojo] kun la nomo de *Danzig Hauptbahnhof*, la 19an de julio 1852, kiam malfermiĝis la linio de Bromberg ĝis Dantzig. Sed ĝi trovis sian definitivitan aspekton, kiam konstruiĝis de 1896 ĝis 1900 la nuna edificio. La arkitekton inspiris la nov-renesanca stilo, kiu estis plej ŝatata tiutempe. Bone rimarku la grandan vitralon kiu provizas lumon al ambaŭ edificioj. Ĉi-tiu



estas do la antaŭ-ulo de la stacidomo de Colmar!

En 1945, ĉe la fino de la dua mond-milito, la stacidomon de Gdansk komplete ruinigis incendio kaj bombardoj. Sed la pola registaro decidis restaŭri ĝin tia, kia ĝi estis. (*Referenco: Wikipedia*)

## 2 La stacidomo de Wrocław

Ankaŭ tiu urbo estis iam parto de la prusa reĝlando kaj poste de la Germana Imperio sub la nomo de Breslaŭ. Nun ĝi rehavigis al si sian polan nomon, kiun oni zorge prononcu pole *Wrocłav*!



Tiu stacidomo estas rimarkinda pro sia simetria arkitekturo. Ĝi estis konstruita de 1855 ĝis 1857 de Wilhem Grapow oficiala arkitekto de la kompanio de Alt-Sileziaj fervojoj. Ankaŭ notindas nov-renesanca kaj nov-gotika inspiro pro la du flankaj turoj, sur kiuj estis fiksitaj la devigaj mur-horloĝoj!

Tre malofta servo aperas en tiu edificio: de 1947 ĝis 2007 funkciis en la okcidenta parto **stacidoma kinejo**, Ĝi estis malgrandega, sed ade frekventis ĝin kinejo-amantoj malgraŭ la novaj mult-ĉambraj

kinejoj.

Ekonomikistoj kalkulis, ke dum ĝia 58jara ekzistado, tiu kinejo kiu estis malfermita 24 / 24h kaj provizis filmon ĉiun duan horon, arigis plimalpli 7 milionojn da spektantoj!

Malgaja evento: Fama pola kinejo aktoro Zbigniew Cybulski estis veninta en Wrocław por fotografia kunsido. Kiam li foriris, la 8 an de januaro 1967 lia trajno estis ekforiranta. Li volis salti sur la enirejan ŝtupon, maltrafis ĝin kaj tragike pereis sub la vagono-radoj!

Je la 30a dat-reveno de tiu evento, Andrzej Wajda [Andĵej Vajda] monde konata film-aŭtoro, alportis memorigan ŝtonon, kiu estis fiksita sur la kahelaĵo de la kajo.

.



Fontoj: Wikipedia